# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 06. Januaro 25, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

## Renato kaj SMG dialogas pri la eŭropa movado

Renato mesaĝas al la karaj membroj de la komisiono pri agado en eŭropo kaj karaj reprezentantoj de la landaj asocioj ĉe la komisiono; mi emas plori, se mi pensas pri la situacio de Eŭropo kaj aparte de Esperanto en Eŭropo. Esperanto estis vere eŭropa ideo celanta la tutan homaron, sed nun la entuziasmo pri ĝi en Eŭropo ŝajnas al mi klare malsupera al la entuziasmo, kiun oni vidas en Azio aŭ Afriko. Mi ne scias kial. Eble eŭropanoj ne plu esperas je pli bona estonta tempo.
Sed nia tasko estas disvastigi la ideon de Esperanto en Eŭropo, kaj tiucele ni devas rekomenci niajn laborojn vojaĝi, eĉ ene de Afriko, sed certe al aliaj kontinentoj.

SMG komentas: La Eŭropa movado ege maturas kaj troaĝiĝas. Afriko havas junecan popolon, plenan je idealismo, spite la malfacilecon vojaĝi eĉ ene de Afriko kaj certe al aliaj kontinentoj.

Renato denove: La punktoj de nia laborplano, kiujn mi volas substreki estas la jenaj:

**Laborplano por 2022-2023-2024**

* Retaj kursoj pri Esperanto en ĉiu eŭropa lando en la landaj lingvoj
* Informi pri Esperanto EU-instancojn kaj popolojn kaj verki tiucelajn informilojn
* Labori por ke la ŝtatoj deklaru Esperanton nacia kultura heredaĵo
* Mezeŭropa Regiona Kunlaboro kaj Balkana Regiona Kunlaboro
* Eŭropa Kongreso de Esperanto en 2024 en Strasburgo

Mi petas vin cerbumi pri tio, kion ni kiel komisiono kaj reprezentantoj de la eŭropaj landoj devas kaj povas fari pri tiuj punktoj kun la konvinko, ke se ni ne faros ion pri tio neniu faros kaj Esperanto en Eŭropo pluiros laŭ la aleo de la sunbsubiro. Tion mi ne volas, ĉar mi pensas, ke Eŭropo kaj Esperanto havas ankoraŭ multon por diri al la mondo.

Renato Corsetti.

SMG komentas: Eŭropo: povus diri multon se ĝi sukcesus rejunigi sin. La EKO-komunikoj certe helpos en la konigo de la laborplano kaj paŝoj por realigi ĝin.

# Greziljono prezentas sian ekonomion al IKEF

Multaj konas la francan Esperanto-Kulturdomon Greziljono, ofte nomatan kastelo Grésillon. Ĝia parolanto, Bert Schumann pretigis raporton por IKEF pri la financa agado de la kulturcentro.

Multaj scias ke tie okazas E-kursoj kaj E-eventoj. Multaj supozas ke ĝi estas senprofitcela asocio kaj tia ĝi ja funkcias, ĉar neniu membro ion gajnas.

Sed laŭjure ĝi estas firmao/kompanio fondita en 1952 kiel kooperativo, kiu aĉetis la terenon kaj konstruaĵojn. La tereno de 18 hektaroj enhavas kverkarbaron, poplejon, lageton, riveretojn kaj herbejojn por tendumi.

La kastelo kaj kromdomoj povas gastigi 60-70 homojn, enhavas manĝejojn, salonon, bibliotekon, festosalonon kaj klasĉambrojn. Okazis en la kulturcentro kvin AMO-seminarioj (vidu la bildon el AMO 33).

| **Numero** | **Monato** | **Temo** |
|---|---|---|
| 15 | 2015, okt. | 'Informado, Instruado' |
| 33 | 2017, apr. | 'Instruado (kune kun ILEI) |
| 68 | 2020 okt. | 'Eo-Centroj' |
| 75 | 2021, julio | 'Kulturo en Eo' |
| 84 | 2022 apr. | 'Verdigi Eŭropon' (kun IFEF kaj VERDEN) |

La kooperativon posedas tricento da e-istoj kaj E-asocioj kiuj aĉetis societajn partojn por iĝi voĉdonrajta membro.La statuta celo estas ĉio pri Esperanto, tial okazas staĝoj kun E-kursoj, E-kongresoj kaj aliaj E-eventoj.

Sed la nombro de e-istaj vizitantoj ne sufiĉas por pagi la altajn kostojn de normala vivo, riparoj, normoj ktp.Kaj la e-istaj eventoj okupas nur ĉ. kvinonon de la jaro. Tial ekde 20 jaroj oni luas la kastelon kaj terenon ekster E-ujo al privataj grupoj por familiaj festoj, asociaj kunvenoj, profesiaj seminarioj.

La enspezoj el luoj ebligis fari gravajn laborojn, plikomfortigi la ejon kaj ankaŭ por ne altigi la staĝo-prezojn dum 10-20 jaroj. Ni invitas ĉiun esperantiston veni al Greziljono por lerni kaj praktiki E-on aŭ por instrui kaj prelegi. Vidu ĝian agendon:



[gresillon.org/agendo](gresillon.org/agendo)

Ni invitas ĉiun komerceman homon proponi kunan agadon por e-istoj aŭ ekster la movado. Kontakto per: kastelo@gresillon.org

Bert SCHUMANN, Retejo: gresillon.org/eo

# Greziljono en 2023 – programeroj

- 2023-mar-04/05 ➡ Multaktiveca semajnfino : akvarelo, natur-arto: informations.
- 2023-mar-25/26 ➡ Multaktiveca semajnfino : Hatha-jogo, akvarelo informations.

- 2023-apr-14/23 ⇢ 12a PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun *Marion Quenut, Paweł Fischer-Kotowski, SZILVA Szabolcs, Przemek Wierzbowski*
- 2023-apr-24/30 ⇢ Ĥora (korusa) renkonto kun *Bernard Bigonnet, Anne Le Bot*
- 2023-apr-24/30 ⇢ BEMI-Semajno de Eo-lingvaj biciklistoj kun *Olivier Buisson*
- 2023-maj-06, 14h ⇢ Membrojarkunveno ĝenerala kaj komitatkunveno.
- 2023-maj-22/26 ⇢ Dediĉo de verkoj
- 2023-jul-02/07 ⇢ 4-a Verda Naturisma Semajno kun INOE
- 2023-jul-07/17 ⇢ 7-a Maratona Esperanto-kurso kun *Mikaelo Bronŝtejn, Radojica Petrović, Szilva Szabolcs, Andrea Bertrand, ILEI-ekzameno*
- 2023-jul-07/17 ⇢ 35-a Internacia E-Konferenco post OSIEK pri variaj temoj
- 2023-jul-18/25 ⇢ 96-a Kongreso de SAT
- 2023-jul-25/aŭg-04 ⇢ 13-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj




- 023-jul-25 /aŭg-04 44-a Renkonto de Eo-Familioj REF
- 023-jul-25/aŭg-04 Renkonto de la Verdaj Skoltoj VS
- 023-aŭg-07/17 9-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)
- 023-okt-23 / nov-02 12a AŬTUNAS, la Esperanto-ferioj,

La kalendaro ĉe:

https://docs.google.com/presentation/d/1dlvc1glI02kHzokcJj21qssVQo3dRWUAAKojqVTzWI0/edit#slide=id.p

## Kurso en Zaragozo

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Kurso de Esperanto
Gvidantonomo: Santiago López
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Zaragoza, Hispanio
Aldoninto: lorenzoN

## Malnovaj skeĉlibroj de SMG ankoraŭ aĉeteblaj

Anna Lowenstein atentigis min, ke la skeĉlibroj ‘Pordoj’ kaj ‘Tridek roluloj’ restas aĉeteblaj en la Libroservo de UEA. ‘Tridek roluloj’ havas kvin skeĉojn, inter kiuj la plej fama estas nepre ‘La psikologo sukcesas’.




**Pordoj**. *Stefan MacGill*. Ilustris Katie Keates. Teatraĵoj. Stefeto. Rotterdam. 1987 (2a eld). 84 paĝoj. Prezo: 3.60 €
Klarigo: Dek unu skeĉoj, gradigitaj laŭ lingva facileco por uzo en komencgradaj kursoj.




**Tridek roluloj**. *Stefan MacGill*. Teatraĵoj. TEJO. Antverpeno. 1981. 72 paĝoj. Prezo: 3.30 €
Klarigo: Kvin amuzaj skeĉoj kun ekzercoj kaj notoj kursgvidantoj.




## Lingvo-planado kun sia revuo

Mi feliĉas anonci la publikigon (papere kaj ciferece) de la speciala numero de la revuo *Language Problems & Language Planning* (LPLP), kies titolo estas "Language, conflict and security" (lingvo, konflikto kaj sekureco) - https://benjamins.com/catalog/lplp.46.2.

Tiu ĉi speciala numero baziĝas sur la prelegoj de la 7a Nitobe Simpozio, organizita de la Universitato de Ulstero kaj CED (Centro por la Esploro kaj Dokumentado pri la Mondaj Lingvaj Problemoj) la 26-27 julio 2021 (https://esfacademic.org/en/nitobe-2021/). La konkludoj de la Simpozio aperas en la enkonduka artikolo de la speciala numero. Resumoj aperas ankaŭ en Esperanto, kiel kutime.

LPLP, kiu estas la revuo de CED, akceptas artikolojn pri ĉiuj aspektoj de lingva politiko. Laŭ SCImago Journal Rank (indikilo, kiu mezuras la gradon de scienca influo de akademiaj revuoj baze de la internacia revua datumbazo Scopus), ekde 2021 LPLP denove apartenas al la plej alta klaso de la revuoj en la faka kampo "lingvoj kaj lingvistiko" (Q1= plej bona 25%).

https://www.scimagojr.com/journalsearch.php?q=23149&tip=sid&clean=0

Michele Gazzola, Ulster University: www.michelegazzola.com

========= vortoj: 1165 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.